

Intervjuo kun Claude Piron (3), tradukado de kantoj en Esperanton.
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 729/104, 1977 septembro 28, 30 kaj oktobro 01.
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-14/SRI-1977-14-A-2-104-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-la-verkisto-kaj-poeto-Claude-Piron-3-Tradukado-de-kantoj-en-Esperanton.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond. Ni aŭdigos al vi hodiaŭ la trian intervjumon, kiun ni faris kun sinjoro Claude Piron, verkisto kaj poeto, pri la temo : tradukado de kantoj en esperanton.

En la unua intervjuo de tiu ĉi serio vi diris, sinjoro Piron, ke esperanto pli bone taŭgas ol la aliaj lingvoj por traduki kantojn. Ĉu vi povus iom pli detale priskribi tion ?

CP.- Jes, mi estas profunde konvinkita pri tio. Fakte la tuta lingvo-konstruo igas esperanton ritme multe pli fleksebla ol iu ajn alia lingvo. Kaj kiel mi diris antaŭe, la ritmo de la lingvo estas la ĉefa faktoro en la tradukado de kantoj. Ekzemple en esperanto, dank' - interalie - al la afiksoj, ofte eblas formi multe pli da sinonimoj ol en aliaj lingvoj. Ekzemple, se vi volas esprimi la ideon 'samklasano', kaj ĝi ial ne taŭgas, do vi povas uzi vorton kiel 'samlernejano', 'studokunulo', tiel ŝanĝante la nombron de silaboj. Aŭ jen alia ekzemplo. Ni imagu ke la tradukanto volas esprimi ian fervorsentan rilaton de unu persono al alia. Se li bezonas tri silabojn, li povas diri 'varmkore'. Sed, se la kanto postulas kvar, li povos diri, same korekte, 'varmakore', se li bezonas tri, li povos diri 'kun varma koro'. Kaj se li volas ses, li povas ricevi 'kun plej varma koro'. Sed tio ne estas ĉio. Mi nur parolis pri la nombro de silaboj. Sed nun, se ni aldonas, ke en esperanto la vortordo estas libera, oni vidas kiagrade tiu lingvo taŭgas por la redono de ia ajn originalo. Ekzemple, en la ĵus dirita ekzemplo, sufiĉas ke oni transloku unu vorton por ke la ritmo komplete ŝanĝiĝu. Ekzemple, 'kun plej varma koro' havas la ritmon 'ta-ti ta-ti ta-ti'. Se vi ŝanĝas la lokon de la vorto 'koro', vi ricevas : 'kun koro plej varma', kies ritmo estas tute alia : 'ti-ta-ti, ti-ta-ti'.

Cl.- Do esperanto povas respeguli ne nur la signifojn, sed ankaŭ la ritmojn en tradukoj?

CP.- Jes, kaj laŭ mi malmultaj lingvoj, aŭ eble eĉ neniu povas esprimi ekzakte la samajn konceptojn laŭ tiom da diversaj ritmoj kaj frazlongecoj, kiom esperanto. Oni povas montri tion per ekzemplo. Jen ses manieroj esprimi la ideon 'mi iris al la kongreso trajne', laŭ tute malsamaj ritmoj kaj tute malsamaj frazlongecoj.

Ekzemple la ritmo

'ti-ta-ti, ti-ta-ti, ti-ta-ti, ti-ta-ti' : 'ni iris per trajno al nia kongreso'

Alia ritmo

'ta-ti-ti, ta-ti-ti, ta-ti' : 'iris ni trajne kongresen'

Tria ritmo

'ti-ti-ta-ti, ti-ti-ta-ti, ti-ti-ta-ti' : 'ni veturis al kongreso vagonare'

Kvara

'ti-ta-ti, ti-ta-ti' : kaj ĉi tiu estas pli longa, frazlongeco ankaŭ estas tre grava en traduko de kantoj aŭ poezio : 'ni trajnis kongresen'

Kvina

'ti-ta, ti-ta, ti-ta' : 'ni trajnis al kongres'

Kaj ses, iom pli subtila

'ta-ti-ti-ta-ti, ta-ti-ti-ta-ti' : 'trajne ni iris al la kongreso'.

Sufiĉas konsideri dum minuteto tiun esprimmanieron por kompreni kial esperanto pli taŭgas ol iu ajn lingvo por la traduko de kantoj. La ebleco elekti inter 'per trajno', 'per vagonaro', 'trajne', 'vagonare', trajni', 'trajnadi', eĉ oni povus diri 'vagonaradi' ktp, kaj loki tiujn vortojn ien ajn en la frazo donas al la tradukanto perfektan ritman flekseblecon. Por ĉiuj tiuj esprimoj

ekzemple en la franca ne estas alia ebleco ol ‘en train’. Jes ja, oni eble povus diri, ‘en chemin de fer’ aŭ ‘par le chemin de fer’, sed se oni prenas tiujn en konsideron, ni devas multobligi, multe pli ankaŭ ol en la franca, niajn esperantlingvajn eblecojn, ĉar ankaŭ en esperanto oni povas uzi la vorton ‘fervojo’ kaj tiam diri ‘fervoje’, ‘fervoji’, ‘fervojadi’, ‘per fervojo’ ktp.

Cl.- Kiu alia faktoro ankoraŭ helpas en esperanto?

CP.- Estas pluraj. Interaliaj, la ebleco uzi iun ajn radikon en formo verba, substantiva, adjektiva aŭ adverba. Pro tiu ebleco oni povas traduki esperanten tute fidele kantojn, kies redono en multaj lingvoj ne eblus. Almenaŭ kun la sama rigoro. Ekzemple en jida kanto ni trovas la sekvantajn refreojn :

(muziko)

Du tiuj vortoj, ‘fideldik’, ‘fideldike’, ‘gefidel’ ne estas rekte tradukeblaj ekzemple en la francan. El la kvar samfamiliaj vortoj de la originalo nur unu ‘violonist’ ekzistas en la lingvo de Molière. Dum en esperanto nenio malhelpas nin uzi la vortojn ‘violona’, ‘violone’, ‘violonis’. Kaj la koncerna kanto fariĝas jena en esperanto, almenaŭ la refreno :

(muziko)

Cl.- La venontan semajnon ni daŭrigos tiun ĉi intervjujserion pri la tradukado de kantoj kun la poeto Claude Piron. Vi aŭdis el Svislando Claude Gacond kaj Claude Piron. Ĝis reaŭdo!

(muziko)